

Eŭropa Bulteno

majo 2006, № 5 (47)

De la redakcio...

Karaj gelegantoj,



Malmö

La 26-an de majo 2006, okaze de la Komuna kongreso de svedaj kaj danaj esperantistoj, kaj 100-jariĝo de la Sveda Esperanto-Federacio kaj de la Klubo Esperantista de Malmö, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio Seán Ó Riain en sia Festparolado salutis partoprenantojn. Plenan tekston de la Festparolado vi povas legi ĉe <http://informado.net/index.php?art=1&art2=29>

Gratulojn al svedaj kaj danaj esperantistoj!

La 6-an de majo Litova Esperanto-Asocio aliĝis al EEU anoncis prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, Povilas Jegorovas.
Ni bonvensalutas niajn gesamideanojn de Litovio!

Agrablan legadon, Vesna Obradović

EŬROPA TAGO EN SLOVENIO

La 8-an de majo mi partoprenis la solenan akcepton en Nacia muzeo en Ljubljana okaze de la Tago de Eŭropo. Ĝi estis preparita de sinjorino Mihaela Zupančič nome de Reprezentejo de EU en Slovenio, kaj de sinjoro Janez Lenarčič nome de Slovena Ministerio por Eŭropaj aferoj. Partoprenis diplomatoj de Eŭropaj landoj, ministroj en slovena registaro, reprezentantoj de diversaj eŭropece orientiĝintaj NROj kaj ĵurnalistoj. Mi partoprenis kiel membro de Societo por eŭropa konscio.

Mi uzis la eblecon kaj parolis pri eblaj subtenoj al la 7-a kongreso de EEU (Maribor, 2007) kun urbestro de Ljubljana, sinjorino Danica Šimšič kaj sinjoro Janez Lenarčič ŝtata sekretario por eŭropaj aferoj. Laŭ la interparoladoj, ni povas esperi, ke ni ricevos iun subtenon de Ljubljana, ĉefurbo de Slovenio.

Vesna Obradović

INTERNACIA SCIENCA KONFERENCO EN KAUNAS



Kaunas

La 12-14-an de Majo, 2006 en Kaunas okazis internacia interfaka scienca konferenco organizita de Departamento de Regionaj studoj de Instituto pri politikaj sciencoj kaj diplomatio de Vytautas Magnus Universitato en Kaunas. Ĉeftemo de la konferenco estis "Lingvo, diverseco kaj integriĝo en vastiĝanta Eŭropa Unio: defioj kaj eblecoj". Krom du plenkunsidoj konferenco laboris en sep diverstemaj sekcioj (po 2 au 3 samtempe) kaj tri kolokvioj. La konferencon partoprenis pli ol cent personoj el 23 landoj.

En la konferenco estis dece reprezentita Esperanto. En la sekcio "Eŭropa Unio kaj lingva diverseco" prelegon faris Michael Cwik el Bruselo. Du kolokviojn pri lingva politiko en Eŭropa Unio gvidis kaj mem prelegis prof. Robert Philipson el Kopenhago. En tiu-ĉi kolokvio krome prelegis vicsekretario de Esperanto Radikala Asocio el Italio Lapo Orlandi. Li eĉ proponis nome de la konferenco akcepti tiel nomatan Manifeston de Kaunas. Pro neprepariteco al tio, kiel de organizantoj tiel de la publiko kaj pro manko de projekto de la dokumento, kompreneble, ĝi ne estis akceptita, sed tio elvokis viglan diskuton. Sendube, tiajn aferojn oni devas anticipe plani kaj antaŭvidi por havi la rezulton.

Prelegon pri temo "Egalrajteco kaj ekonomieco de internacia kunlaboro" faris sekretariino de Litova Esperanto-Asocio Aida Cizikaite (tiu-ĉi prelego estis preparita kune kun prof. Otto Haspra el Budapesto). Krome, en la kolokvo prelegon pri lingvaj minoritatoj en Eŭropa Unio faris prof. Roland Breton el Francio.

Precipe aktiva dum la konferenco estis Michael Cwik, kiu faris multajn demandojn kaj komentojn al diversaj prelegantoj. Entute estis legitaj 70 prelegoj kaj raportojo.

Konferencon partoprenis ankaŭ prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas kaj estrarano, direktoro de Vilnusa teknika kolegio Algimantas Piliponis. Litova Esperanto-Asocio iom helpis en organizaj preparlaboroj de la konferenco. Bedaŭrinde, ke pro diversaj kauxoj konferencon ne povis partopreni ankoraŭ kelkaj renomaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj intencis veni al Kaunas kaj sendis resumojn de siaj prelegoj.

La ĉefan enkondukan prelegon al la temo dum la unua konferenca plenkunsido faris elstara fakulo pri lingvo-politiko prof. Bernard Spolsky el Izraelo. Menciindas, ke ĉi-jare en Vilnius en litova lingvo aperos fama libro de prof. Robert Philipson "Ĉu nur anglalingva Eŭropo?". Tiu-ĉi libro estis reklamata dum la konferenco.

Povilas Jegorovas

ESPERANTA FUTBALTEAMO VOLAS KVALIFIĜI POR LA MONDA POKALO EN SUD-AFRIKO EN 2010-a



La iniciantoj de la teamo estas la artistoj Olof Olsson kaj Daniel Salomon, kiuj kunlaboras sub la nomo "La Loko". Olsson kaj Salomon estis en Berlino en marto 2006 por promocii sian projekton.

"La Loko" uzas Esperanton en projektoj reflektantaj pri lingvo, kulturo, teritorio kaj ekonomio. Antaŭe ili surbendigis la unuan Esperantan sitkomon en la mondo kaj lanĉis la Esperantan rapidmanĝejoĉenon "Ovo".

Per lanĉi Esperantan futbal-teamon, 'La Loko' proponas al la ludantoj kaj la fervoruloj futbalon sen

nacia ŝovinismo.

'La Loko' ĉeestos en Germanio dum ĉi somera Monda Pokalo kaj lobios FIFA-n direkte, kaj ankaŭ ĝiajn anojn kaj ĝiajn asociojn.

Ĉi somere la Esperanta futbalteamo ludos matĉojn en Kopenhago (la 20-an de majo), Rejkjaviko (la 17-an de junio) kaj Sarajevo (la 12-an de aŭgusto).

'La Loko' provas nuntempe aranĝi matĉon en Berlino en julio. <http://www.laloko.org>

Johanna Domke


ESPERANTA TRADUKO DE LA GRANDA HISTORIO DE HERODOTO

Helena Esperanto-Asocio ĝoje anoncas ke laste aperis la nova, tre signifa verko de la greka esperantisto S-ro Spiros Sarafian la 625paĝa Esperanta traduko de la granda Historio de Herodoto. Temas pri la unua en la mondo Historia verko, kreaĵo de la patro de la scienco, nomita "Historio".

Kiel unua verko, ĝi estas ne sisteme formita Historio, sed ampleksa rakontado de historiaj eventoj en kiu enmiksiĝas la malnovaj mitoj, la priskribado de proksimaj kaj malproksimaj landoj, detalaj informoj pri la civilizacio, la moroj, la vivmaniero, la tradicio de konataj kaj nekonataj eĉ ekzotikaj popoloj.

Temas samtempe pri Historio, Geografio, Etnografio, Etnologio, Folkloro; pri vere loganta rakontado de ĉio koncernanta la popolojn kaj la landojn de la tuta antikva mondo.

Tiu grandioza verko, bone tradukita en simpla kaj glata Esperanto, eĉ riĉigita per preskaŭ mil ekspliknotoj de la tradukanto, nepre kovros grandan malplenan de la Esperanta Biblioteko.




Spiros Sarafian

INTERESO DE ĴURNALISTOJ PRI ESPERANTO – ĈU HAZARDO?



Dum la 13a de majo okazis jam 24an fojon la *Malferma Tago* en la Centra Oficejo de UEA. Partoprenis plena cento da vizitantoj, hejmaj kaj eksterlandaj.

Interesaĵo de la aranĝo ĉiukaze estis partopreno de la ĵurnalistino de nova, ĉiumonata „opini-ĵurnalo“: *Nieuw Rotterdam*, kiu pasigis en la Oficejo tutan tagon kaj estis ŝajne samtempe impresita, surprizita kaj entuziasmita pri la temo de Esperanto, bezono de komuna lingvo en Eŭropa Unio kaj lingvaj rajtoj.



Dum la aranĝo ŝi intervjuis kelkajn e-istojn, krom aliaj ŝi ankaŭ parolis kun EEU-estrarano Peter Baláž – ĉefe pri la temo de defendado de minoritataj lingvoj, bezono de komuna neŭtrala lingvo por EU kaj pri ŝancoj de Esperanto en tiu kampo. La artikolo aperos en la junia numero de la revuo (ĉe la nova paĝaro de EEU aperos poste la kopiita artikolo).



Same pri la "*Tutslovakia renkontiĝo de esperantistoj*" (okazinta dum la 26a-28a de majo en Piešťany, Slovakio – kies ĉefa temo estis "60-jariĝo de la gazeto "Esperantisto Slovaka) informis amaskomunikilojn *TASR* = "Presagentejo de Slovaka Respubliko", kies informon sekve prenis kelkaj radioj kaj gazetoj (Rádio Viva, Rádio Nitra, Fun Rádio, tutŝtata gazeto SME), kaj informis pri la okazaĵo kaj pri Esperanto.

Tiuj ĉi du aranĝoj (kiujn mi ene de monato ĉeestis) nur konfirmas malveron de la aserto, ke homoj (ĵurnalistoj, politikistoj aŭ simple "ordinaraj" homoj) tute ne interesiĝas pri Esperanto. Multaj simple ne scias pri la ekzisto de E-o (eĉ neniam aŭdis la vorton), multaj ne konscias pri ĝia daŭra ekzistado (por multaj tio estas afero de pasinteco) kaj aliaj en la hasto de vivo ne havas tempon okupiĝi pri "lingva demokratio" kaj "lingva diskriminado" (multfoje nek tiuj kiuj devus laŭprofesie, laŭpostene).

Kompreneble ke ekzistas ankaŭ tiaj, kiuj konscie malakceptas Esperanton, tamen mi kredas ke ili ne estas plimulto (malgraŭ ke ili jes povas esti en altaj pozicioj kaj tiel ankaŭ influi la decidojn vast-skalajn). Dum la ontaj monatoj kaj jaroj certe plivigliĝos diskutoj pri la lingva solvo ene de EU – kaj tiun ŝancon ni – Esperantistoj – devas eluzi plejeble efike. Bela ekzemplo de la aktualeco de tiu temo estas ankaŭ ĵusa anonco de Finnlando, ke dum


ilia EU-prezidanteco estos disponigataj aktualaj informoj ankaŭ en la latina! Tio klare montras ke malgrandaj landoj (kun malgrand-nombre-parolataj lingvoj) iom ekkonscias pri la problemoj kaj hierarkiigo lingva nuntempa.

Nun venas nia tempo por agi – por antaŭeniri la diskutojn pri la plej bona/taŭga solvo de *EU-Babilonio*. Nur post vasta, oficiala malfermo de la diskuto ĝenerala pri lingva politiko (kiun devintus prizorgi ĉefe malgrandaj EU-ŝtatoj, nacioj) kaj situacio en EU ni povas esti pli serioze traktataj ankaŭ de deciduloj, ĝis tiam ili ne havos veran intereson pri Esperanto.

Bazaj ŝtonoj jam tamen estis metitaj (Nitobe-simpozioj, Nitobe-centro, Praga Manifesto, EEU-agado...) - nun restas nur saĝe pluigi kaj trafe argumenti. Tiel ni povos atingi celon, jam de Zamenhof revatan – pli vastan uzadon de Esperanto, por ke ni ĉiuj povu renkontiĝadi (ĉu tra Eŭropo, ĉu tra la tuta mondo) ne kiel hungaroj kun irlandanoj, slovakoj kun grekoj, sed kiel "homoj kun homoj".

Peter Baláž

PRI LA KONGRESO ANKAŬ EN MONTOJ



Esperanto societo de Maribor, Slovenio, organizis de la 27-a ĝis la 28-a de majo "Printempan renkontiĝon" sur Pohorje, montaro apud la urbo. Ĉefa temo de nia renkontiĝo estis 7-a kongreso de EEU (Maribor, 2007).

Partoprenis entute 24 geesperantistoj de Aŭstrio (7) kaj Slovenio (17).

Estis ankaŭ kurso por komencantoj. En la plej juna grupo partoprenis tri sesjaraj geknaboj.

Ni ekskurzis, amikiĝis, amuziĝis...

Fotoj pri bonhumoro de la renkontiĝo vi povas rigardi ĉe www.esperanto-maribor.si



Vesna Obradović


INTERNACIA LINGVO EN INTERNACIA FAMILIO



"Vi ne estas japanologo, via edzo estas japano, do vi certe bone parolas angle" tiun facilan konkludon mi jam aŭdis multfoje. La granda surprizo, kiu aperas sur vizaĝoj de interparolantoj, kiam ni diras, ke hejme ni uzas Esperanton estas tute natura sed foje povas nervozigi. Multe pli amuze estas, kiam homoj, aŭskutante nian babiladon rimarkas: "vi tiom bone parolas japane" aŭ "itale". Eeh... bedaŭrinde, al nia pola socio mankas lingva aŭskultkapablo.

Nuntempe, kiam la angla lingvo regas tutmonde, oni tre malfacile povas imagi, ke en la internacia familio

oni ne uzas la anglan. En tute? Jes... tute ne. En nia malgranda varsovia loĝejo ĉiutage ni parolas esperante. Nur? Ne, nature, multaj frazoj malbelas per aldonadoj de la pola aŭ de la japana. Okazas foje, ke ni komencas paroli pole, interne metas du-tri japanajn vortojn kaj la fino esperantas. Tamen Esperanto plejpartas dum niaj hejmaj konversacioj, regas en niaj kapoj. Nature jam ni pensas kaj "sonĝas" esperante. Strange... mi neniam suspektis, ke iu ajn "fremda" lingvo povas tiom nature aperi en mia kapo, kiam mi komencas interparolon.



Esperanto estas por mi ne nur lingvo per kiu mi ĉiutage komunikas kun edzo. Mi uzas ĝin ankaŭ en laborejo. En nia malgranda eldonejo de japanaj komiksoj mi laboras kun Aleksandra kaj Ken'ichiro Watanuki, pol-japana paro, per kiu mi estis esperante "infektita". Verdire pri la uzado de Esperanto en mia hejmo kaj laboro mi povas kulpigi ĉefe Aleksandran. Ni amikas jam 25 jarojn kaj estis ĝuste ŝi, kiu montris al mi utilecon, facilecon kaj belecon de la internacia lingvo. Aleksandra kun Ken'ichiro longe loĝis en Japanio, kaptis tie multajn esperantajn kontaktojn kaj finfine, iujare invitis min: "Venu, kara, rigardu kiel mi vivas,

konatiĝu kun miaj esperantaj amikoj". Kiam mi veturis al Japanio en 1996 jaro, mi verdire iom timis. Esperanton mi tiam konis ege malbone, kaj ne povis imagi kiamaniere mi sukcesos komunikiĝi kun japanaj esperantistoj. Surloke tamen montriĝis, ke oni ne necesis timi. Dum du monatoj, mi estis devigita preskaŭ ĉiutage babili en la internacia lingvo kaj mia esprimkapablo rapide progresis. Dank' al tio mi povis "kapti" esperantan edzon kaj "porti" lin al Pollando. Komence, nature ni multege uzis esperantajn vortarojn, ĉar mi ne parolis japane, kaj li ne pole, ambaŭ sufiĉe malbone regis la anglan, kio do restis al ni?

Ni geedziĝis en la jaro 1998, kaj ĉe nia geedziĝifesto amuziĝis kun ni polaj kaj japanaj esperantistoj. Nia filo, Taro, denaska, sed ankoraŭ ne plene "konscia" esperantisto, aperis en nia familio la kvinan de majo 2005. La kvinan de majo oni festas en Japanio kiel "tago de infano". Por ni estis ankaŭ grava tago en nia normala esperanta familio. Ĉu li babilos esperante? Nature. Kaj oni certe demandos lin estonte: Kiun strangan lingve vi parolas? Ĉu indas uzi tiun esperanton, se la tuta mondo parolas angle?

Esperable li respondos tiam: "Mi neniam, verdire, pensis ĉu indas. Ni simple uzas Esperanton hejme. Geonkloj, kaj konatuloj ankaŭ parolas esperante". Kaj se iu demandos: "Kiel vi eklernis tiun esperanton?" li simple suprentiros la ŝultrojn - "Tute nature". Oni ja ne demandas birdojn kiamaniere ili flugas.

Kiel mi menciis - ni uzas E-on ankaŭ por preparoli profesiajn aferojn. Tio estas ofte "ŝoko" por eksteraj personoj. Ĉiuj oficistoj, kaj laboristoj de eldona branĉo en Pollando, kiuj kontaktiĝas kun ni, ĉiam ege surpriziĝas: kiulingve parolas tiuj "stranguloj". Nature tio estas amuza, sed samtempe ni ege bedaŭras, ke tiom facilan kaj utilan lingvon oni ne enkondukis al internacia interkomunikado. Tamen, karaj, se ni ofte kaj ĉiutage montros al aliaj, ke E-o tamen vivas, ke povas esti elemento de ĉiutaga ekzisto, se ni ĉiam substrekos, ke ĝi estas multe pli facila ol iu ajn nacia lingvo, certe estonte aperos pli da esperantaj familioj. Foje homojn ne estas allogataj per ideologio sed per la praktika flanko de la ideo, movado aŭ lingvo...

Martyna Taniguchi

LA PLEJ AMASA KURSO FINIĜIS

La 30-an de marto per la dissendo de la 19-a leciono finiĝis supozeble la plej amasa en mondo Esperanto-kurso. Temas pri jam menciita en "landa agado" reta konatiga E-kurso, komencita la 4-an de decembro 2005 en tri rusiaj dissendolistaj serviloj - Subscribe.ru, Maillist.ru kaj Content.mail.ru.

La kurso estis konatiga, do, oni ne atendu pretajn esperanto-parolantojn post ili. La dissendita lecionaro estis maksimume malkomplika kaj kun pretendoj je amuzado: ĝi estis verkita en la formo de fantazia rakonto, kies heroo petveturas en futura kosmo, lernante kaj uzante E-on.

Tamen estas agrable noti, ke la abonantaro de la kursoj por hodiaŭ estis 7280 personoj. Do, nun en la ruslingvaj landoj (la kursojn abonis ankaŭ ukrainoj, bjelorusoj, kazahoj, israelanoj ktp) estas multe pli da "saluton-esperantistoj". Jam estas informoj, ke iuj el ili reaperas en la lokaj ĉeestaj kaj en pli seriozaj retaj E-kursoj.

Andrej Grigorjevskij

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 30-an de majo 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Povilas Jegorovas, Johanna Domke,

Spiros Sarafian, Peter Baláž, Martyna Taniguchi, Andrej Grigorjevskij

kaj Vesna Obradović.

Leterojn kaj komentojn sendu al la serretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>